

La forto de Esperanto: Unu simpla raporto

DEGUCHI Kyotaro

Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto

Mi DEGUCHI Kyotaro, la prezidanto de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto, tre ĝojas havi okazon paroli al vi. Oomoto estas japana religio, kiu fondiĝis en 1892 pere de mia praavino kaptita di-spirite. Kvankam pri tiu ĉi simpozio mi delonge havas grandan intereson, al mi klariĝis la detaloj ĵus lastatempe. Do, mi ne estas bone preparita kaj mi timas, ke mia parolo ne trafos la celon kvazaŭ infano volas mane preni nebulon aŭ nubon. Sed, se vi permesas min, mi volas paroli iom pri mi, Oomoto kaj Esperanto. Mi ne estas profesoro, nek specialisto, nek sciencisto, nek premiito. Mi do volas paroli laŭ mia kapablo, nome simple naive, en malpli ol ordinara nivelo.

En 1923 Oomoto enkondukis Esperanton en sian organizaĵon. Por kia celo? Mi imagas jenajn celojn:

1. Simpatio kaj konsento al la homaranismo de d-ro Zamenhof.
2. Kredo, ke Esperanto estas la monda komuna lingvo, kian profetis la Sankta Libro de Oomoto.
3. Mondskala interkomunikado pere de Esperanto.
4. Internacia propagando pri Oomoto.

Kaj, mi diru, kial Oomoto enkondukis Esperanton ĝuste en tiu tempo.

1. Mia avo, DEGUĈI Onisaburo, kiu estas la kunfondinto de Oomoto, dumlonge cerbumis pri iom enigma profetaĵo de la fondintino de Oomoto, nome: "La mondo estas kunligita per simplaj aboco-literoj." Kaj Onisaburo ĝin deĉifris, kiam li eksciis pri Esperanto pli detale, okaze de Esperanto-somerkurso ĉe iu japana fama universitato, sendinte sian sekretariinon al la kurso en junio 1923. Laŭ lia kompreno de la profetaĵo, la mondo devas havi interkomunikan pontlingvon, kia estas Esperanto.

2. Bahaano s-ino Finch venis al Japanio, kaj hazarde renkontis vojaĝantan mian avinon, nome la edzinon de Onisaburo, en iu loka vagonaro, kaj poste ŝi vizitis Oomoton. Ŝi vizitis Oomoton dufoje, nome en 1922 kaj 1923.

3. En tiu tempo tra Japanio blovis la vento de liberala ideo, pacama sento kaj simpatio al internacia amikeco post la unua mondmilito.

4. Bonokaze, ankaŭ la japana Esperanto-movado estis en pli alta tajdo.

Ekde la enkonduka jaro Oomoto okazigis Esperantajn kursojn por oomotanoj kaj neomotanoj, eldonis gazetojn, kaj sendis partoprenantojn al kongresoj enlandaj kaj eksterlandaj. Precipe dum 12 jaroj, ekde 1923 ĝis 1935 Oomoto arde aktivis por diskonigi Esperanton mem kaj samtempe por sciigo pri Oomoto mem pere de Esperanto en la mondo.

Tamen, se oni demandas min, kiomgrade Oomoto kontribuis al disvastigo de Esperanto rezulte de tio, mi ne povas doni bonan objektivan respondon. Mi persone rigardas ĝin bedaŭre kun la timo, ke Oomoto aktivis ne tiom sufiĉe kiom oni esperis. En tiu senco mi esprimas mian sinceran pardonpeton al esperantistoj enlandaj kaj eksterlandaj.

Plie, kiom da fruktoj estis alportitaj post la propagandado pri Oomoto mem pere de Esperanto? Ĝis nun, al mi ŝajnas, ke neniuj faris precizan takson pri tiu rezulto. Se temas pri la nombro de

enlandaj oomotanoj, kies oomotaniĝo estis motivigita per Esperanto, tio estas tre malgranda nombro. Laŭ mia imago, sufiĉas nur miaj fingroj por kalkuli ilin. Kaj se temas pri la samo de eksterlandaj kredantoj oomotanaj, ne estas granda diferenco.

Tiuj nombroj saĝnas tro malgrandaj, sed oni povas rigardi alian gravan flankon. Antaŭ ni staras konkreta fakto, ke la ekzisto de Oomoto, kaj ties historio kaj aktiveco, kaj la pensmaniero, estis diskonigitaj tra la mondo, danke al Esperanto! Bona ekzemplo troviĝas en Brazilo. En tiu loko, Esperantaj gvidlibroj de Oomoto tradukiĝis en la portugalan fare de loka esperantisto, kaj ĝi estis kaj estas bona medio de nia misiado.

Bedaŭrinde, ekde 1935 ĝis 1945 Oomoto estis dissolvita kaj malaperigita fare de tiama japana registaro pro subpremiĝo kontraŭ religio. Ĉia aktiveco estis malpermesita inkluzive de Esperanto.

En 1946 Oomoto restariĝis por la tria fojo, ĉar ĝi jam dufoje ricevis religiajn subpremiĝojn antaŭ la dua mondmilito. Ankaŭ la organizaĵo por Esperanto en Oomoto, nome Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto, reviviĝis kelkajn jarojn post la restariĝo, en 1950. La tiama prezidanto de tiu organizaĵo estis s-ro Ito Eizo. S-ro Ito uzante Esperanton vojaĝis eksterlanden unu jaron ekde julio en 1959 ĝis julio en 1960. Liaj vojaĝspertaj raportoj rezultis vekigi novan intereson pri Esperanto inter oomotanoj.

S-ro Ito dum la vojaĝo restigis interesajn epizodojn al eksterlandaj esperantistoj. Jen anekdoto pri li:

En tiu tempo, estis tre malofta afero, ke unu sola japano vojaĝas dumlonge en aliaj landoj. S-ro Simo Milojeviĉ, la antaŭa ĝenerala direktoro de UEA, iam malkaŝis la fakton, ke la unua eksterlanda esperantisto, kun kiu li parolis en Esperanto estis s-ro Ito. Tiu sperto kuraĝigis la junan esperantiston Simo Milojeviĉ plu studi Esperanton. Kaj li rimarkis ke eĉ en Japanio troviĝas inteligenta homo!

Kaj alia epizodo:

Iu esperantisto ŝerce demandis s-ran Ito, "Kia pano estas japano?" Kun milda rideto li respondis (pensante pri haŭtkoloro), "Japano estas iom pli bone bakita ol eŭropano."

Ankaŭ en tiu tempo vizitis Oomoton s-ino Doris M. Worcester el Londono. Ŝi loĝis ĉe Oomoto dum kelkaj jaroj kaj aktivis ne nur por oomotanoj sed ankaŭ por japanaj esperantistoj en diversaj lokoj. Mi komencis lerni Esperanton en 1960, en la aĝo 24-jara, kaj mi havis okazon paroli kun ŝi. Ŝi tiam sentigis min pri la mirindeco de Esperanta interparolo.

Jam menciitaj interfluoĵoj reciprokaj, oficialaj aŭ privataj, estas tre malgrandaj, sed ili estas notindaj fruktoj de Esperanta interamikiĝo, mi pensas. Ĉar, rezulte de ili, s-ro Simo Milojeviĉ fariĝis eminenta esperantisto, kaj mi fariĝis esperantisto maleminenta.

Poste, en la jaro 1963, kun la aĝo 27-jara, mi unuafoje partoprenis en la 48 a Universala Kongreso, en Sofio.

1. Pere de tiu sperto mi ekhavis firman kredon jenan. Nome, kiam oni instruos Esperanton du aŭ tri horojn semajne en mezgradaj lernejoj en la mondo, kadre de deviga edukado, ĉiuj junuloj en la mondo tuj povos facile interparoli kaj korespondi unu kun la aliaj.

2. Kaj mi havis ankaŭ tian penson, ke Esperanto devas esti uzata kiel unu el la oficialaj lingvoj en Unuiĝintaj Nacioj, kaj en aliaj ĉefaj instancoj en la mondo.

3. Plie, mi ekhavis esperon, ke oni eldonu Esperantan version de famaj gazetoj kiel *New York Times* aŭ *London Times*, ktp.

La nun menciitaj tri ideoj ankoraŭ restas en mi, kaj mi trovas ilin eĉ pli necesaj hodiaŭ kaj morgaŭ.

Post tiu UK la grandparto de miaj tempo kaj energio devige estis uzitaj por ne-esperantaj laboroj kaj lernadoj pro mia laborpostenoj. Tio daŭris pli-malpli dudek jarojn. Mi dumlonge ne

povis rilati al Esperantaj aktivecoj, neeviteble. Tamen, proksimume antaŭ dek jaroj, oni ŝovis min porti la prezidantecon de EPA.

Nun Oomoto havas rimedon interkomuniki uzante ankaŭ la anglan lingvon. Oni ne povas neglekti la potencon kaj utilecon de la angla lingvo en la nuna reala mondo. Sed mi tute ne povas imagi, kia fariĝus mi aŭ Oomoto sen Esperanto. Mi kredas, ke la influo de Esperanto al mi kaj Oomoto estas tre granda.

En Oomoto estas moto jena:

Unu Dio

Unu Mondo

Unu Interlingvo

Tiu unu mallonga moto montras al ni, kiom grava estis kaj estas Esperanto por mia organizaĵo, Oomoto. Ankaŭ por la homaro. Oomoto konsideras Esperanton tre signifoplena laŭ la menciita moto, kaj mi deziras, ke vi ĉiuj bone komprenu.

Tiu ĉi simpozio celas reviviĝon de la espero de d-ro Nitobe Inazo. Mi opinias, ke ni daŭre elmontru la heredaĵojn de grandaj antaŭuloj, pacamon kaj homaranismon, kaj ni klopodu vekti multan atenton de aliuloj al la realigo de la Verda Mondo.